

5<sup>a</sup>. Kial Majenco anstataŭ la pli simila Majnco?

6<sup>a</sup>. En pluraj landnomoj la permesita -io + -ujo-sistemo (ĉe kapvortoj) ne plenumatis: nur -i- en ekz. Belorusio, Jugoslavio, Vjetnamio.

7<sup>a</sup>. PIV donas Lasso = Lasao, kaj Lhaso = Lasao, sed strange NPIV donas Lasao = Lasso kaj Lhaso = Lasao (ĉu estas du?).

8<sup>a</sup>. Kial ĝustaj en la singularo kaj kun minusklo la vortoj "fenico" kaj "katalaŭno", dum Lapitoj kaj Laroj?

9<sup>a</sup>. Kial Hago (= *Den Haag*) sen la artikolo, sed La-Pazo kaj La-Plato?

10<sup>a</sup>. Pri Aŭstralio ĉeestas la provincŝtatoj Tasmanio, Viktorio, Kvinlando, kaj la strangnoma Nova Sud-Kimrujo (= Njusaŭzvelso, se Kvinlando ne estas Reĝinlando). Tamen mankas Vestralio kaj Saŭstralio (Suda Aŭstralio entenas Saŭstralion, Tasmanion, Viktorion kun Melburno, kaj parton de Vestralio).

NPIV estas utila, tre utila, por kritikemaj specialistoj (ekz. tiuj kiuj specialiĝas pri teĥnikaj kaj alisciencaj aferoj, speciale botaniko), kaj por lingvistoj kiuj deziras trovi Fundamentecajn tradukojn por la centoj da nenecesaj neologismoj troveblaj en la Ido-ismema literaturo. Por ordinaraĵoj Esperantistoj sufiĉas bona nacilingva vortaro kaj Plena Vortaro. Tio ne signifas, ke NPIV ne estus bonega fonto por enciklopediaj informoj, kaj por la multaj ekzemploj de konataj verkistoj, precipe *Zamenhof*, kaj ofte por fidebla klarigo kaj vortpluformado. Ĝi estas giganta verko montranta al la ne-Esperantistoj kiom vasta Esperanto estas (kaj kiom multe pli oni devas lerni ol la vortokolekton en la lernolibroj).

Mi persone aĉetus ĝin: 1<sup>a</sup>. se mi ne havus la malnovan PIVon;

2<sup>a</sup>. se mi bezonus la novajn sciencajn nomojn, botanikajn, zoologiajn, fizikajn, ĥemiajn, teĥnikajn, kiuj ne troviĝas en mia malnova PIV;

3<sup>a</sup>. se mi ne kuraĝus (kvankam rajtus) elekti aŭ krei, laŭ mia propra gusto, la novajn kaj la ankoraŭ ne en Esperanton "tradukitajn" vortojn geografiajn (ekz. mi devis memfari por Aŭstralio, de kiu troviĝas en NPIV nur malmultaj Esperantaĵoj, multajn Esperantigojn kiaj Darvino, Alburio, Pertho, Laŭncestono, Njukastlo, Murajrivro, Kanguruinsulo, Botanibajo, Gundagajo).

#### Adreso de la aŭtoro

Marcelo LEEREVELD

12 Heather Grove

AUS - Belgrave South, VIC 3160 / AŬSTRALIO

#### Priaŭtoro informo

Instruisto ĉe Aŭstralia Somerkursaro, aŭtoro de 100-paĝa "Por ĝuste uzi Esperanton", havebla ĉe UEA. Nova eldono sub la titolo "Lingvaj resondoj por ĝuste uzi Esperanton" (200paĝa) havebla ĉe Aŭstralia Esperanto-Asocio.

## Terminologia anguleto

### *Claudius et Chloris*

Pardonu, ke mi kreis arbitran nomduopon el la romia imperiestro kaj el la helena flordiino. Ĉi tiu lasta, samkiel *Chloë*, etimologie koheras kun *ĥloë* = juna herbo kaj *ĥloros* = flave verda aŭ verdeta. Eĉ du romiaj imperiestroj, *Constantius I* kaj *Constantius II*, havis alnomon *Chlorus*. Fine, ankaŭ la ĥemia elemento *Chlorum* ricevis sian nomon laŭ la sama koloro.

Kial mi mencias ĉion ĉi?

Ĉar en Esperanto oni tre malbonŝance oficialigis la fonetisme kaj grafisme misan nomformon "kloro". Tiu faro spitas la fontlingvon kaj la vaste internacian uzon. Dum *Claudius* restas en iuj lingvoj kun C (kp. la francan *Claude* kaj la italan *Claudio*) kaj aliaj lingvoj fonetike adaptas ĝin per K (ekz. la zamenhova *Klaŭdio* kaj la ĉeĥa *Klaudius*), *Chlorum* kutime konservas sian digramon CH, ne misformante ĝin per K: angle *chlorine*, ĉeĥe *chlór*, france *chlore*, germane *Chlor* k.t.p. Escepton prezentas la hispana *cloro* kaj same la itala. Do, Esperanto ŝajnas tute izoliĝi kun sia K, kiu draste eliminis kaj la fontlingvan, kaj la fundamentan fonemon Ĥ. *Zamenhof* klare konsciis, ke la ekstrema simpla fonetika sistemo de lia lingvo bezonas tiun ĉi fonemon precipe por la leksiko scienca.

En 1997 mi dokumentis, ke Ĥ en 276 mineralnomoj nepre ne cedu al K. El ili 58 nomoj enhavas la vorteron *ĥlor* (laŭalfabete ekde cerio-piroloro ĝis zonohlorito). Krome, la sama vortero ofte aperadas en la nomenklaturaj ĥemia (ekz. ĥloroformo), botanika (ekz. ĥloro), entomologia (ekz. ĥloropo), farmakologia (ekz. ĥloramfenikolo), medicina (ekz. ĥlorozo) kaj multaj aliaj.

Fronte al ĉiaj ĉi internacie establitaj terminoj apenaŭ eblas paciĝi kun la oficiala "klor" kaj riski, ke Esperanto procedu tiom diverĝe.

Do, ĉu mi esperu esti konvinkinta almenaŭ unu paciencon leganton, ke la fontlingvaj CL (*Claudius* = *Klaŭdio*) kaj CHL (*Chloris* = *Ĥlorido*) ne estas por Esperanto identigendaj fonetisme-grafisme?

Dr. Josef Kavka  
Lužná 7 – Vokovice  
CZ – 160 00 Praha 6  
ĈEĤIO